Bolanta Kaldrono

INFORMILO 275 de la
Esperanto - Grupo Bremen
Aprilo - Junio 2005

Sekr: D-ro Hans Walter Krüger, Dordrechter Str 36, 28259 Bremen, Tel: 0421 561943
Informoj: Prezidanto OstR Hellmut Grebe, Tel: 0421 3963480
Kasistino: Ruth Bohn, Tel: 0421 382715
Red: Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, 28279 HB, Tel/Fax 8476806, hartig.hd@t-online.de

Vizitu nin en Interreto: **www.esperanto.de/bremen**
Dort präsentieren wir unser aktuelles Programm und unsere Zeitung Informilo

Ni gratulas kore:

La Esperanto-Grupo Subvisurgo festas sian dekjaran ekziston.

Jen bukedo por la jubilantoj.

Nia venonta programo

La 13an de aprilo: Prepara diskuto pri nia 100-jara jubileo.
Atentu la preparon "**Tamburi por la 100- jubileo**" en tiu ĉi Teku.

La 18an de majo: Prelegos d-ro Markus Beckmann pri la interesa temo
"Kio estas Homeopatio? – Alproksimiĝo al alternativa kuracmetodo."
D-ro Beckmann raportos tre kompetenta pri sia profesio. La alternativa kuracmetodo evidente estas aktuala alternativo kaj multfoje montriĝis, ke ĝi estas pli sukcesplena ol la lerneja metodo. Ambaŭ plenigas siajn lokojn.
Rekomendinde estas, ĉeesti tiun sendube interesan prelegon.

La 4an de junio nia Maja ekskurso al Rodenkirchen por kun plezuro partopreni al la jubilea festo de la grupo Subvisurgo. Ni interkonsento pri la veturo kaj kunveturo.

La **Maja Ekskurso** anoncita por la 11a de junio **ne okazos**! Anstataŭ tio ni petas la membrojn de nia bremena grupo partopreni jubilean aranĝon de la Esperanto grupo Subvisurgo. Vidu la aldonitan programon kun la skizoj de la vojo.

La 06an de julio **Ĝardenfesto, Invitas s-ino Ruth Bohn**

En Aŭgusto ni feriu! Ni deziras al vi feliĉan kaj agrablan tempon.

Tamburi por la 100-jara jubileo de nia Esperanto-Grupo en 2006

En la tuta jaro 2006 ni festu per diversaj publikaj okazaĵoj nian jubileon. Ĝis fine de tiu ĉi jaro ni finos la ĝeneralan programon kaj fiksos la okaz-lokojn.
La aktivaj membroj kaj eksteraj helpantoj devas esti sufiĉe frue informitaj pri iliaj taskoj, por ke ili bone preparu sin,
Nia sekretario jam trovis en nia arkivo taŭgajn historiajn faktojn por verki el tio festan "Bolantan Kaldronon".
Dum la jubilea jaro ni aranĝu trihorajn Esperantokursojn por konigi nian lingvon. Je la fino la partoprenantoj decidos mem, ĉu daŭrigi aŭ ne. Ni nome konstatis, ke longaj kursoj kaŭzas mankon de partoprenantoj.
En nia lasta trihora kurso decidis la partoprenantoj ĉu daŭrigi.
Ni plurfoje informu la publikon per la bremenaj tagĵurnaloj. Ni jam nun komencu.
Ekspozicioj en publikaj oficejoj aŭ lokoj. Ni esploru jam nun, de kie ni povus lupreni ekspozician materialon. Eble de la grupo Hamburg, GEA aŭ de Herzberg. La menciitaj grupoj legos tion, ĉar ili ricevas nian Informilon.
Por publikaj tradukprezentaåoj ni petos eksterlandajn esperantistojn agi kun ni. Nia amika grupo en NL Groningen certe helpos nin.

Retrospegulo

La 9an de februaro ni kunvenis por trakti nian jarkunvenon. Antaŭe kunvenis la estraro kaj la kasorevizoroj ĉe Ruth Bohn, nia kasistino. La estraro preparis la jarkunvenon, por ke ĝi bone kaj racie sukcesu. Apudĉambre en la kaso tintis la moneroj, kiu montris al ni, ke ni ne estas bankrotaj.

Hellmut, nia grupestro bonvenigis la grupanojn. Sekvis la raportoj de nia sekretario, de nia kasistino kaj de la redaktoro. Oni esprimis la konfidon al ĉiuj aktivaj estraranoj.

Menciinde estas la estrarbaloto. Kurt Meyer deziris retiriĝi. Jardekojn li plenumis tiun oficon. Ni akceptis lian deziron kaj sincere ni dankis pro lia fruktodona kunlaboro. Lia posteulo estas d-ro Markus Beckmann. Ni danke akceptis, ke li transprenis tiun taskon.

Pri nia 100a jubileo ni decidis pretigi ĝis la jarfino taŭgan programon. Estis avertaj voĉoj, kiuj atentigis, ke ni nur rajtas plani kaj prepari aferojn, kiujn ni vere kaj bone povos plenumi. Alikaze ni "pafus en la fornon!"

Dieter Hartig

Aldonis nia sekretario: Feliĉe kelkaj interkonsentoj estis aranĝitaj antaŭe, Markus Beckmann funkciis kiel balotgvidanto..

La 9an de marto prelegis Hellmut Grebe pri vojaĝo al la norda parto de Portugalio.

La preparoj de la projekciilo jam estis pretaj, kiam ni alvenis. Estis ja iom aventura turkonstruaĵo, sur tablo li metis seĝon. Sur la seĝo servis vortaroj kiel subapogiloj, por ke la projeciilo funkciu celtrafe.

Inter ni estis gasto, kiu hazarde legis pri nia kunveno kaj intencas informiĝi pri Esperanto. Laŭ lia parolmaniero oni tuj konstatis, ke li estas svisano. Li estis tre agrabla juna gasto. Ĉar li ne kapablis Esperanton, Hellmut interplektis foje germanlingvajn tradukojn, por ke li komprenu modelajn frazojn.

Per la prelego kaj lumbildoj Hellmut gvidis nin tra bela regiono kaj haltis antaŭ eminentaj konstruaĵoj kaj aliaj interesaj elrigardoj.

Portugalio estas lando, de kiu oni nur malofte aŭdis ion. Estis bone, ke Hellmut ankau tuŝis la historion. Precipe dum la presentado de historiaj konstruaĵoj. Li komparis ankaŭ la situacion kun la najbara Hispanio.

Ni estas danka pri lia interesa kaj informa prelego. Koran dankon!

Ruth Bohn, nia kasistino parolis pri la rilatoj kun GEA. Post detala klarigo ni publikos tiun problemon.

Dieter Hartig

Niaj ekstergrupaj rilatoj

Invitas Esperanto–Grupo Unterweser

La grupo festos la 10an jubileon!! La 4an de junio 2005.
Ili festos en Rodenkirchen kaj esperas pri nia partopreno.

Ni renkontiĝu je la 11a horo ĉe la gastejo «Am Sporthafen». Tie ni tagmanĝos. Ni povos partopreni ekskurson per la tabulŝipo «Hanni» kaj esplori la suban Weser-regionon. Posttagmeze shanty—ĥoro kantos. Oni regalos nin per kafo kaj kuko.

La aliĝilo kaj la vojpriskribo estas aldonitaj

Esperantoklubo en Kolumbus

Komenca kontakto kun simpatiaj esperantistoj el Kolumbus en Ohio, Usono.

La grupanoj el Kolumbus sendas al la membroj de nia grupo korajn salutojn.

Ni interkonsentis, interŝanĝi niajn Informilojn kaj ankaŭ letere aŭ retleter teni kontakton. La Informilon de la grupo en Kolumbus nomiĝas **Ligileto,** vi jam vidis ĝin dum nia jarkunveno. La ricevitajn leterojn ni legos en niaj grupkunvenoj.

La Esperanto-Grupo en Kolumbus havas ĉirkaŭ 10 membrojn kaj kutime kunvenas 5 ĝis 10 gemembroj je la monataj kunvenoj.

Esperanto Grupo Nienburg

Sendas regule al ni legindan Informilon. Jam ofte ni aranĝis entreprenojn kun niaj nienburgaj geamikoj.

El la Programo: la 5an de aprilo prelegos s-ino Elfriede Benthin pri la tikla temo **“Ĉu Dio estas Dio de militoj?”**

Esperanto-Klubo Groningen–Drente Nederlando.

Jam de jardekoj ni estas ligitaj kun la groningenaj geamikoj kaj minimume unufoje jare ni aranĝas komunan entreprenon. Ĉijare ni revidos nin en Rodenkirchen.

Ni danke ricevas la altkvalitan kaj valorenhavan periodaĵon **“La verda Stelo**.”

La Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA)

Ni jam multe profitas de tiu organizaĵo. Multajn jarojn ni gastis en fervojaj kunvenejoj. Krome estas membroj de GEFA en nia Bremena Grupo. Ankoraŭ nun GEFA invitas nin partopreni al iliaj kunvenoj.

La 20a – 21a de Aprilo 2005, Seniora renkontiĝo en Gotha.
La 7a – 14a de Majo 2005, Internacia kongreso en Brasov, Rumanio.

Menciinde estas la GEFA – periodaĵo **“Fervoja Esperantisto”.**